



Eldonas: Cercle espérantiste de \* Abono por unu jaro : 15 FF  
l'Agenais, F 47340 LAROQUE \* (12 FF por Francio)  
Poŝtkonto: 3 371 74 M Bordeaux \* al la ĉi-apuda pĉk.  
\*\*\*\*\*

## enhavo

Esperanto-gramoj (Antoni Madej)	... 2
<u>Nia debato</u> : Mortpuno (I) (Jakelino, Jansebo, J.G., Suzanne)	... 3
Balado pri lakeo de Imperiistoj/Balado pri fia ordoperturbanto (Johan Valano)	... 8
Vivo de "Laŭte!" . Broŝurservo de SAT (Kribo)	... 10
Alvoko al Esperantistaj Tradukistoj (Czupkaĵko)	... 12
<u>Nia pasintjara felietono</u> : Tra Eŭropo per fervojo kaj esperanto (Jakelino)	... 13
Nia kriminala felietono (Jakelino)	... 17

La faldebla adresaro de Laŭte 1980.

En la koloraj paĝoj :

I/IV.

E-vivo (Gujan-Mestras, Orientaj Pireneoj, Atlantikaj  
Pireneoj, Vaŭkluzo Federacio, Bretonio, Katalunio, Aĝenio,  
Girondio) kun la informoj senditaj de niaj tieaj abonantoj.

Mankas ĉi-numere nia felietono "Tra la mondo per biciklo",  
kiu ne povis trovi lokon. La aŭtoro profitas de la paŭzo  
por ripari sian rel-biciklon...

Al ĉiuj sunplenan someron!(ni ne havas  
legantojn en suda hemisfero, ve!...)

Antoni Madej :  
"ESPERANTO-GRAMOJ"

Kial ?

Respondu, karaj estrantoj  
Demandon de la sofisto :  
Kial lingvon Esperanto  
ne lernas esperantistoj ?

Pri unu preleganto

Certe bona li estus preleganto  
Se li pli bone regus Esperanton.

Cart-aĵoj

Ni fosu nian sulkon...  
Nepoj vidos rezulton...  
Ni fosu nian sulkon...  
Impona estos sepulto...  
Ni fosu nian sulkon...  
Kaj ĝi fariĝos kulto...

Pri iu samideano

Kuraĝe li mondajn problemojn frontas  
Sed, porti la verdan steleton hontas.

Laŭmode

Min ravas la jupo  
sed pli,  
sub ĝi,  
la dupo.

Libera elekto

Ĉiu elektas sian destinton,  
Kiam elektas sian edzinon.

Nia Golgota

Multaj homoj pro rava hipnoto  
mem elektas ĝisvivan golgoton.

Pri unu sinjorino

Ŝia agado  
Edzinformato.

Nia debato  
pri

## MORTPUNO

Jakelino enkondukas :  
\*\*\*\*\*

Ĉar armado kaj mortpuno estis ambaŭ debatemoj de la SAT-Amikara kongreso de Pasko 1980, kaj ĉar pri malarmado oni ĵus debatis en Laŭte!, mi opinias, ke eble estas bone, ke ni debatu ankaŭ pri mortpuno.

\* \*  
\*

Pri la filozofio de respekto al ĉiu vivo, pri homrajtoj, pri la rajto de socio sin defendi, ktp, ktp, oni povas debati dum paĝoj kaj paĝoj. Tial mi volas nur citi ciferojn kaj faktojn :

- malpli ol unu franco jare mortas per gilotino ;
- nur en unu malliberejo franca, Fleury-Mérogis, mortas unu franco po monato per sinmortigo pro nekapablo plu elteni la vivkondiĉojn en la modela malliberejo ;
- almenaŭ du usonaj kondamnitaj preferis morton ol vivon en usona malliberejo (mi ne scias, ĉu Usono havas kvartalojn por alta sekureco, aŭ aliajn metodojn trakti "dangĝerulojn");
- Andreas BAADER kaj Ulrike MEINHOF mortis en lando, kie ne ekzistas mortpuno ;
- la debato, ĉu Giscard devas aŭ ne gilotinigi Jacques MESRINE finiĝis antaŭ ol ĝi povis komenciĝi, pro la bonaj servoj de la kontraŭbanditara brigado.

Mi dankas vin pro via atento, nun, skribu kiom da paĝoj vi volos pri vivo kaj morto, sed ne forgesu, ke gilotino estas, eĉ en Francio, la malplej ofta formo de mortpuno.

Jakelino.

N e aboli, sed ...  
\*\*\*\*\*

Encivilizita lando, ne utilas apliki la regulon "Okulon pro okulo, denton pro dento". Oni devas respekti vivon. Plie, se oni kutimas uzi mortpunon, tio iĝas facila rimedo kontraŭ io

ajn, ekzemple politikaj kontraŭuloj. Oni ĉiam riskas mortigi nekulpulon. Plie, mortpuno estas malsana spektaklo por perfortemuloj.

Tamen, la viktimo rajtas esti protektata kaj sekuremaj honestaj civitanoj rajtas pli da sekureco ol homoj, kiuj vole elektis danĝeran kontraŭlegan vivon.

Ekzemple, la registaro toleras, ke personaj aŭtomobiloj mortigas pli ol 15 000 homojn ĉiujare (anstataŭ uzi trajnojn, pro ekonomiaj pretekstoj). Neniu protestas, ĉar la vivo de homo estas senvalora, kiam temas pri anonimulo. Sed kiam temas pri konato, eĉ gangstero, lia vivo multe pli gravas.

La mortpuno estas armilo. Tial, oni devas uzi ĝin, nur kiam ne estas alia ebleco. La krimuloj uzas mortpunon : se la ŝtato disponas ĝin, povas esti paradokso : homo riskas malliberecon, se li faras krimon kaj mortpunon, se li ne faras ĝin. En tiu kazo la justico devas esti pli kredebla ol la krimularo.

Ne necesas aboli la mortpunon. Tiu devas ekzisti, sed esti uzata kiel eble plej malofte. Estas nia respondeco konstrui sanan socian komunumon, en kiu ĝia uzo ne estos necesa. Kiam la socio estas malsana (ekzemple, apero de perforto, seninteresiĝo pri publikaj aferoj, malamago inter sociaj klasoj, troa bezono pri sekureco, ktp...) foje ne estas alia rimedo.

Kiam timantaj amasoj donas la povon al diktatoro, eĉ se mortpuno ne ekzistas, li restarigas ĝin. Aŭ kiam eĉ demokrataspekta registaro nepre bezonas mortigi danĝerulon, tio okazas kontraŭleĝe aŭ "akcidente" - anstataŭ, ke oni donas al li la protekton de la leĝo.

Konklude, mi diras, ke mortpuno devas malaperi, ne per leĝo, sed per manko de kondamnitaj kaj bonfarto de nia socio.

Jansebo.

Socia venĝo ...  
\*\*\*\*\*

Depost la dua mondmilito oni amase mortigas la homojn en koncentrejoj, karceroj, rifuĝintejoj, per murdigoj, torturoj, malsato. Milionoj da homoj estas oferataj por "savi"

la Liberan Mondon, la Marksism-Leninismon, la grandecon de Allah, ktp...

Al la perforto de la ŝtatoj rebatas la perforto de la diversaj ribelantoj : gerilanoj el Suda Ameriko, el Palestino, ktp. En la "demokrataj" landoj la urbaj gerilanoj uzas la eksplodilojn aŭ kaptas ostaĝojn celante akceli la alvenon de revolucio en la koncernaj landoj. (E.T.A., Ruĝa Armea Frakcio, Ruĝaj Brigadoj, ktp). Ofte ili trafas eminentulojn de la reĝimo, sed kelkfoje ankaŭ senkulpajn viktimojn. La homa vivo estas, kiel oni povas diri en financa lingvaĵo, "valoro elkurzigitaj".

La nuna socio estas saturita de perforto kaj sekrecias la krimon : apartaj kvartaloj, kie oni kunigas la malriĉulojn en la grandaj urboj kaj kiuj eksplodas fronte al la bienposedantoj (vidu en Usono kaj en Zairio), "bonaj civitanoj", kiuj, por "ludi", mortigas arabojn aŭ samseksemulojn en Francio, junulaj bandoj en domblokoj, kiuj seksperfortas virinon kaj senprudentiĝantaj mortigas ŝin, frenezuloj aŭ drinkuloj, kiuj mortigas sub nekonscia impulso.

La krimuloj kun sociaj aŭ individuaj kialoj ekzistas. Tion oni ne povas nei. Oni povas nur esperi, ke en socio pli justa kaj kunvivanta la krimoj malpliigos, sed ĉiam ekzistos danĝeraj individuoj, kontraŭ kiuj la socio devas sin protekti. Por iuj la mortpuno estas radikala maniero solvi la problemon de la "malsimpatiaj" personoj, kiu samtempe flatas la sadismajn instinktojn (memoru la nombron da spektantoj, kiam la ekzekutoj estis publikaj en Francio !). Sed oni ne povas nomi tion justico ; tio estas socia venĝo, nenuligebla eĉ se oni rekonos poste, ke la juĝistoj eraris ! Estos tro malfrue ! La ĝismorta karceroj ? Ĝi fabrikas "monstrojn", kiel diris MESRINE, kiu provis la aferon, ĉar la malliberuloj estas senesperaj kaj pretaj al ĉio por ĉesigi tiun neeltenblan sorton. Ĉu reedukado en kolektiva laboro por la komunumo ? Laŭdire, Popola Ĉinio spertis tion komence de la Revolucio, sed laŭ rakontoj de partoprenintoj, tio de antaŭlonge similis al "devigaj laboroj"! Ĉu ripar-laboro profite al la parencoj de la viktimo, kiel proponis kelkaj humanistoj ? Laŭ mia vidpunkto ĝis nun neniam socio korekte solvis tiun problemon, pri kies graveco ni devas pripensi !

J.G.

# Nepunitaj krimoj...

\*\*\*\*\*

La mortpuno neniam malemigus iun mortigi, same kiel, evidente, ĝi ne revivigis la viktimojn. Plie, kian kontentigon ĝi alportas al la familianoj ?

La dumviva mallibereco havas la saman rezulton kaj venĝas nenion, ĉefe en "kvartaloj por alta sekureco" oni uzas perfidajn metodojn, celante neniigi homon ; travivi, suferi tiajn agadojn dum jaroj, eĉ monatoj, estas centoble pli kruela ol la gilotino. Ja, la antaŭaj horoj, kaj la lastaj minutoj, verŝajne, estas preskaŭ neelteneblaj, sed, kompare kun la kruelaĵoj de la modernaj torturoj suferataj dum jaroj, la gilotino estas preferinda.

Se tio - profesie mortigi homon - ne estus realaĵo, tio estus neimagebla... Ĉu tiaj homoj povas serene vivi intersiaj familianoj...? Laŭ vidpunkto, la gilotinisto estas malpli kruela ol tiu, kiu, dum jaroj, iom post iom, mortigas homon, kies suferojn kaj "evoludon" li konstatas ĉiutage. Senemocie tiel agi, ĉu tio ne estas inda de monstro ?

Ja, ne estas rekomendinde, mortigi homon, sed tiu, kiu mortigas unu, estas malpli kulpa ol tiuj, kiuj trudas atomcentralojn, kiuj trudas radiografiojn, vakcinadojn, ktp. Pri radiografio ĵus okazis televidaĵo. Laŭdire, iu kuracisto (radiologo) diris : "...ke estus perdi tempon, surti plumbŝirmilon al la paciento!". Ĉu li ne estas mortiganta plurajn homojn tra sia paciento ? Ja, tio estas malpli okulfrapa... Same kiel Seveso kaj similaj aferoj... kiom da homoj tiaj homoj mortigas !

Ralph Nader, usona advokato, atentigis antaŭ pluraj jaroj, (inter aliaj danĝeraĵoj) la aŭtomobilistojn pri malperfektaĵoj en aŭtoj de famaj fabrikmarkoj, kiuj kaŭzis akcidentojn. Nun en Francio la pneŭoj V12 kulpas gravajn akcidentojn, kaj ĝis nun oni ne forigis ilin el la vendo...do... Ĉu ĉio ĉi-supra ne estas krimaj agadoj ?

La konkludo similas tiun pri armado. Nova vidmaniero estas nepra : la profito, la potenco ne plu estu dioj ; tiam la krimuloj malaperos. Tio ne signifas, ke kelkaj krimuloj ne manifestigos, sed ili estos multe malpli, des pli ke la ĉefaj kialoj ne plu ekzistos. Unuvorte, la profito estu

for el la homsocio, kiu estus bazita nur sur la bezono.

Suzanne.

## LA EKZEKUTISTO

\*\*\*\*\*

Fine

Diris la ekzekutisto

Mi ne komprenas kial vi grumbblas kontraŭ mi

Unue la ekzekutistoj estas necesaj

Same kiel la fabrikestroj.

Se ne plu estus fabrikestroj

Kiu pagus la laboristojn ?

Kaj se ne plu estus laboristojn

Kiu pagus la malsukcesojn ?

Kredu min

Sur la tero

Ĉiuj laboroj havas sian utilecon

Mi estas la ekzekutisto

Certe mi preferus monon fari

Sed mi devas alporti monon al mia edzino

Kaj zorgi pri la edukado de miaj infanoj.

Metu vin je mia loko !

Tuj ! diris la kondamnito

Kiu interfrotis al si la manojn

Ekprenis la hakilon

Kaj senkapigis la ekzekutiston

Kun tiom da vigleco

Ke kortuŝaj larmoj fluis el la okuloj

de la spektantoj.

Marcel RIOUARD

(ekspoeto de la franca satira gazeto

"Le Canard Enchaîné" - Katenita Anaso)

Aliaj kontribuoj pri tiu temo aperos en venonta numero.

Balado pri lakeo de Imperiistoj

"Obscena estas li vipur'  
 kaj plago de la sindikato,  
 tion deklaris sen humur'  
 pri li la Centra Komitato.  
 Do lin ne aŭdu, marksa frato :  
 lin tordis lerta manipul'  
 de propagando kaj vulgato ;  
 li estas nur reakciul'.

"Li laŭte blekas pri tortur',  
 vortaĉas kontraŭ aŭtokrato,  
 eĉ diras, ke nia struktur'  
 socia servas al ekspluato,  
 sed ĉefe signas lin stigmato  
 ke li favoras al pravul'  
 eĉ kontraŭ parti-aparato :  
 li estas nur reakciul'.

"Kaj tute prave la cenzur'  
 malhelpas al ĉi advokato  
 de objektiva procedur'  
 la veron diri pri la ŝtato.  
 Li estas aĉa demokrato  
 kun burĝa kredo al regul'  
 pri justa trakto kaj kompato :  
 plej tipe pri reakciul'."

Dediĉo

Fortuloj, zorgu pri homfrato  
 kiu batalas kontraŭ bato  
 al ĉiu ajn justa postul'!  
 Ja spite al via diktato,  
 plu pravas la reakciul'.

Ĉi tiu balado povas esti citata nur ĉe simila  
 citado, samtempa kaj samloka, de la Balado pri  
 fia ordoperturbanto.

Johan Valano

Balado pri fia ordoperturbanto

"Dangera estas li vipur'  
 kaj plago pri aŭtoritato,  
 kiu prizorgas pri sekur'  
 kaj pri bonordo en la ŝtato.  
 Do lin ne aŭdu, kara frato,  
 lin formis fia bolŝevist'  
 kaj subfosula aparato :  
 li estas aĉa komunist'.

"Li pledas kontraŭ la tortur',  
 indignas kontraŭ plutokrato,  
 asertas ke nia struktur'  
 socia servas al ekspluato.  
 Lin krome signas la stigmato  
 ke li alvokis al rezist'  
 al ŝtatpolic' iniciato :  
 li estas aĉa komunist'.

"Kun plena pravo la cenzur'  
 malhelpas al ĉi advokato  
 de egaleco kaj kultur'  
 aŭdigi sin en la debato.  
 Li estas stulta "ruĝokrato" ;  
 kaj ŝtatprotektita policist'  
 lin rajte traktu sen kompato :  
 li estas aĉa komunist'."

Dediĉo

Sinjoroj, zorgu pri homfrato  
 kiu batalas kontraŭ bato  
 al homa digno, kun persist' ;  
 finvenkos ne via diktato  
 sed pravo de la "komunist'".

Ĉi tiu balado povas esti citata nur ĉe simila  
 citado, samtempa kaj samloka, de la Balado pri  
 lakeo de Imperiistoj.

- "Malmalice" La Nueva Frontiera eldonejo.  
 Librofako de Literatura Foiro.  
 Kuopio - Pizo 1977.

V I V O  
de  
"Laŭte!"

Registrita estas nun la 274a abono por 1980. Ĉu baldaŭ la 300a ?...

Ĉiu trovos sian "Adresaron" en tiu ĉi junia numero. Por pli oportuna

uzado, bonvolu faldi, tranĉi kaj agrafi ĝin.

- Jes, jes, paĉjo, ni ja kutimas tiun someran labor-eton !

- Ha, bone. Mi pardonpetas pro la superflua konsilo; kaj ankaŭ pro la fakto, ke tiu ĉi adresaro preskaŭ ĉiutage ricevas modifojn. Jen kelkaj novaĵoj jam registritaj :

p.14, forigu René Girard el Strasburgo kaj loku lin en 70000 VESOU, 38 rue Pierre de Coubertin.

p.21, bonvolu aldoni : - Czupkaŭko Zbigniew, PL 24-220 Niedrzwica Duża (Pollando) kaj ŝanĝi la adreson de Guy Coste (antaŭe en Uppsala - Svedio, nun: Sandvägen 1B, S 810 71 ÄLVKARLEBY.

La venonta numero de "Laŭte!" aperos fine de aŭgusto.

Broŝurservo  
de  
S.A.T.

La ĝisdatigitan liston de la disponeblaj tekstoj ĉiu trovos en tiu ĉi "Laŭte!" sur blua folio. Bonvolu noti, ke denove havebla estas "Pri la esperanta

literaturo" de R.Laval. Krome...

ĝoju la fervoruloj, kiuj jam mendis el la dua eldono de "Kiel diri...?"! Ili ne atentos ĝis aŭgusto. Nova provizo el 500 ekzempleroj estas jam pretaj kaj nun dissendata. Kelkaj plibonigoj akompanas tiun reeldonon: pli bela titolpaĝo (vd. la apudan paĝon!) dank'al ilustraĵo de Ĝineta, pli blanka papero, kaj - tio ne estas paradokso - pli kompleta listo da modifendaĵoj, kiuj faras tiun frazeologion ankoraŭ pli fidinda. Tiuj, kiuj posedas la unuan eldonon, bonvolu uzi la liston de p.12 por korekti sian ekzempleron.

La neposedantoj povas tuj mendi "Kiel diri...?" al La Juna Penso, F 47340 Laroque Timbaut, poŝtkonto n-ro 3 374 04 M Bordeaux. Prezo : 15 FF por unu ekzemplero (kun afranko inkluzivita). 20% da rabato por minimume 5-ekzemplera mendo.

# kiel diri...



**PRAKTIKA  
ESPERANTA  
FRAZEOLOGIO  
(5000 ESPRIMOJ)**

Kompilis :  
**LENTAIGNE**

Cercle espérantiste de l'Agonais  
"Laŭte!"  
1980 \* 15 FF

Korektoj  
al "Kiel diri...?"  
\*\*\*\*\*

3/10 Por nenio oni faras nenion	43/5 <u>Plifruigi</u> ies morton.
4/13 VITO : ... Ĉiro	
11/15 Koloniaj kampanjoj	43/17 Vidvino post homo, kiun mi konis; de oficisto.
12/4 Turni posten la ĉevalon	
12/19 : .... mungeton	47/7 sekci arterion
16/6 Dormo donos konsilon	47/11 forstreki "fimozo"
19/7 Vidvino de (sen ":")	
21/5 Multo da mono	48/1 <u>inkudo</u> (anst. indukto)
31/12 Hipotensiulo. Hipertensiulo.	
36/7 Esperanto...pli facila	49/4 Perdi la fadenon en parolo
36/10 Biblio...sur <u>kiu</u> lingvoj	
42/13 Tia buĉado mallonoras la civilizitan mondon	65/10 Pluvas kvazaŭ <u>la akvo estus verŝata</u>

\*\*\*\*\*

A L V O K O al Esperantistaj Tradukistoj  
\*\*\*\*\*

Multaj esperantistoj agas en la kadro de la internaciaj fakaj organizaĵoj. Ankaŭ esperantistaj tradukistoj / tradukantoj/ devus grupiĝi por kunordigi la individuajn laborojn, organizi internaciajn kongresojn kaj seminariojn (en kunlaboro kun UEA kaj FIT - Internacia Federacio de Tradukistoj), publikigi artikolojn kaj verkojn pri la tradukarto, interŝanĝi spertojn pri la tradukado de beletraĵ, sciencaj, popularsciencaj, teknikaj, publicismaj kaj ĉiufakaj tekstoj.

Por fondi internacian asocion de esperantistaj tradukistoj mi petas rimarkojn, proponojn, opiniojn, projekton de la statuto kaj aliajn materialojn. Ĉiujn kontribu-aĵojn bonvolu sendi al jena adreso :  
S-ro Zbigniew Czupkałło, PL 24-220 Niedrzwica Duża, Pollando.

\*\*\*\*\*

El letero de Pierre Landard, jena konsilo : Mi volus diri al la kontraŭkomunistaj gekamaradoj : "Penu konservi afablecon kaj realismon!, " tiom, kiom mi devus konservi ilin, se mi volus esti vera komunisto....(Spit!)

Nia pasintjara felietono :

TRA EŬROPO per FERVOJO  
kaj ESPERANTO ...

Resumo de la antaŭaj ĉapitroj : "Poste ni iris al la ĉefpolicejo, sed, kiel mi antaŭvidis, ĝi jam estis fermita ĝis la morgaŭo..."

... Mi tute ne miris pri tio ĉio, ĉar mi havis sperton pri alia socialista lando, GDR ; en Rostock mi kaj pluraj aliaj francaj diplomitinoj de germana lingvo, elirinte je la 9a horo el la universitato, sukcesis atingi la ĝustan bankon 5 minutojn antaŭ la 11a horo. Je la 11a horo ni estis senkompatate enŝlositaj interne de la banko, sed oni konsentis preni niajn frankojn kaj lasi nin iri. Do mi konsilas al kamaradoj, kiuj volas viziti socialistan landon, ke ili tuj sin informu pri la adresoj de la ĉefpolicejo kaj de la banko, kiu akceptas kapitalistan monon. Atentu : ofte civitanoj de tiuj landoj naive kredas, ke oni povas iri al iu ajn banko aŭ al iu ajn policejo de la urbo, kio nek en GDR nek en Slovakio estas vera. Tamen, ĉar en Bratislava la ĝusta banko fermiĝas pli malfrue ol en Rostock, franca turistoj, kiu sufiĉe komprenas la germanan por interparoli kun slovakaj maljunuloj, racie povas antaŭvidi, ke li estos en ordo kun la banko antaŭ la fino de la tago. Sed tiu tago de la banko nepre devas esti la unua tago, ĉar laŭleĝe oni devas trovi antaŭ la fino de la dua tago tiun el la grizaj blokoj, en kiu sin kaŝas la ununura policejo de la urbo, kiu akceptas kapitalistojn. Se oni ne estas helpata de loka esperantisto, certe dum 2 tagoj oni plenumos nur formalajojn. Sed, se oni estas helpata de esperantista civitano de socialista lando, en sia propra lando oni kuros, kiam oni volos reciproki la gastigadon. Ĉar en Strasburgo Walter havis la strangan ideon iri rigardi, kio estas trans Rejno, ni eksciis, ke la konsulejo de Federacia Respubliko estas malfermita nur de la 8a ĝis la 12a. Ĉar dum tiuj matenhoroj honestaj francoj laboras, li iris kun Montserrat, kaj, ĉar ŝi estas kataluna, ŝi iom konfuziĝis, tradukante de la franca al Esperanto la klarigojn de la germana oficisto. Finfine, Walter revenis al mia loĝejo kun pluraj ekzempleroj de demandaro en franca, angla kaj

germana lingvoj, kiun li devis plenigi per informoj veraj laŭ sia konscienco, diris la teksto. Kun ridoj ni kune plenigis la demandaron, kaj li devis atendi almenaŭ unu semajnon la respondon de la germanoj, ĉu li rajtas iri de Strasburgo al Karlsruhe (80 kilometroj). Poste Walter volis plilongigon de sia restadpermeso en Francio, kaj por tio ni iris al la prefektejo de Malalta Elzaco, kie oni respondis al ni, ke pri restadpermeso de pola civitano en Francio kompetentas la konsulo en Krakovo, kaj ne la prefekto en Strasburgo. Walter kolere diris, ke estas vere tre logike flugi al Krakovo por tie demandi, ĉu li rajtas resti en Strasburgo, sed ne eblis diskuti, ĉar la oficisto estis fakte multe malpli afabla ol estis malliberejaj gardistoj, kiujn mi iam reale vidis. Sed kompreneble ĉio tio okazas en la kadro de la "malstreĉiĝo de rilatoj okcidentaj-orientaj".

Tial en la slovaka banko surprizis min nur la fakto, ke la kasistino tute korekte prononcis mian aŭverninan nomon, kiujn francoj neniam korekte prononcas, kaj pri kiu elzacanoj diras, ke, se ĝi estas nefranca nomo de franca civitanino, do oni prononcu ĝin, kiel oni povas.

Posttagmeze mi trinkis teon kun sinjorinoj Zlatica kaj Maria en la kafejo konstruita super la nova danuba ponto. De tiu kafejo oni havas rigardon al la tuta Bratislava, kaj eĉ ekvidas Vienon.

Do, la trian tagon mi releviĝis por iri al la policejo, kies griza bloko ĝojinde estas proksima de la griza bloko, kie loĝas sinjorino Magda. Male de GDRaj policejoj, ne necesas montri legitimaĵon por povi eniri. Ni eniris, kaj kompreneble devis atendi. Sub grandega portreto de Lenino estis "informiloj" senpagaj por turistoj, ĉiuj sovetaĵ, kaj hazarde ĉiuj en franca lingvo. Mi prenis unu ekzempleron de ĉiu. Post atendado malpli longa ol en GDR, malfermiĝis la pordo de la ĉambro, kie oni akceptas kapitalistojn. Policisto prenis mian pasporton kaj la legitimaĵon de sinjorino Magda. Li donis al mi demandaron en angla lingvo, kaj, dum mi plenigis ĝin, li demandadis sinjorinon Magda. Unue li demandis ŝin, kial mi iris al ŝi, anstataŭ iri al sinjorino Alzbeta, kiel estis skribite sur mia vizo, kaj ŝi klarigis, ke sinjorino Alzbeta ferias, kaj ke ambaŭ apartenas al la Esperanto-klubo. Li metis aliajn demandojn, sed mi ne kom-

prenis pri kio, ĉar mi ne scipovas la slovakon. Li reprenis la demandaron, kiun mi finplenigis kaj forstrekis la vorton "turismo" por ĝin anstataŭigi per vorto, kiun mi ne komprenis: ŝajne, se oni gastigas ĉe esperantistino, oni ne plu apartenas al la leĝa kategorio "turismo". Post iom da stampado ni estis en ordo kaj povis eliri.

Poste alvenis sinjorino Zlatica, kaj, estante en ordo, mi finfine povis trankvile turismi. Ni vizitis la palacon de la primaso de Hungario. En ĝi troviĝas spegul-galerio, sed malpli granda ol en Versajlo, kie Napoleono la Unua subskribis packontrakton kun sia estonta bopatro, imperiestro Francisko de Habsburgo-Loreno. Tiu kontrakto estas nomata "paco de Presburgo", ĉar la urbo havas tri nomojn: unu slovakon, unu germanlingvan, unu hungaran. En tiu malnova epoko, oni ankoraŭ ne donis Nobelpremiojn al militistoj, kiuj subskribas packontraktojn. En la spegulgalerio, rusaj laboristoj, kiuj verŝajne meritis ĉe la konstruado de la soveta socio, aŭskultis klarigojn en rusa lingvo pri Napoleono kaj lia bofamilio. Krom rusoj, estis en la palaco de la primaso de Hungario serio de 6 anglaj murtapiŝoj, kiuj iam estis teksitaj por reĝo Karlo la Unua de Anglio. Sed, ĉar tiu reĝo estis malhomece traktita de la Angla Respubliko, la tapiŝoj laŭ malklara maniero finfine estis ekposedataj de la primaso. Nuntempe, plu ekzistas en Anglio nek respubliko nek mortpuno, plu ekzistas nek en Francio nek en Aŭstrio nek en Rusio imperiestro, kaj en Bratislava ne plu estas primaso de Hungario, do ĉio tio estas malnova historio, sed plu estas en la palaco la 6 belaj anglaj tapiŝoj, kiuj reprezentas la grekan miton pri la malfeliĉa amo de Leandro kaj Heroa. Poste ni iris al la kastelo de Bratislava, sed ni ne havis tempon por ĝin viziti. Ĝi estis konstruita en Mezepoko, en la epoko de Granda Moravio, kaj plurfoje renovigita, interalie de Maria-Tereza. Tiu kastelo de Granda Moravio simbole estis elektita en 1968 kiel kadro por la subskribo de la aŭtonomiĝo de Slovakio. Ni revenis al la loĝejo de sinjorino Zlatica, kaj mi donis al ŝi ekzempleron de PIV kiel dankadon por la grupo de Bratislava.

La posttagmezon mi trapasis kun sinjorino Magda. Ni vizitis ŝian klubon de pensionitaj instruistoj. En ĝi estis ĉefe sinjorinoj. Unu el ili bone parolis la francan, ĉar tiuj sinjorinoj tre interesiĝas pri fremdlingvoj. Sinjorino Magda



lernis en sia junaĝo la germanan kaj la hungaran, kaj ŝi parolas ankaŭ Esperanton kaj la francan lingvon. Mi diris al sinjorino Magda ke, por elspezi miajn neeksport-eblajn kronojn, mi deziras aĉeti libron pri vidindaĵoj de Slovakio en por mi komprenebla lingvo. Ni iris al butikoj, kie estas vendataj libroj el GDR, kaj tie mi trovis libron en germana lingvo pri arta historio de Slovakio, kun multaj fotoj. Per ĝi mi eksciis pri la historio de Slovakio : en frua Mezepoko Slovakio apartenis al granda slava regno : Granda Moravio, kiu pereis pro invadoj. Proksimume ĉe jaro 1000 Slovakio estis aneksata de Hungario. En la 16a jarcento, ĉar la turkoj invadis grandan parton de Hungario, Bratislava fariĝis ĉefurbo de tio, kio restis de tiu lando. Sed, ĉar la lukto kontraŭ turkoj multe malfortigis la hungaran regnon, Habsburgoj profitis la okazon por fariĝi ĝiaj reĝoj, kaj de tiu tempo ĝis 1918 Slovakio, Hungario kaj Aŭstrio restis ligitaj. Tamen la hungaroj forpelis la turkojn, tial Francisko-Josefo kaj Sissi ne estis kronataj en la katedralo de sankta Stefano en Bratislava, kiel estis Maria-Tereza, sed en Budapeŝto, tradicia ĉefurbo de Hungario.

Vespere estis kunveno de la Esperanto-grupo. Estas en ĝi pluraj junaj lernantoj, kaj ankaŭ malpli junaj esperantistoj. La grupo parolis pri reciproka gastigado de bulgaraj esperantistoj, kiuj deziris viziti Bratislavan. Tamen, ne estis tiom da ĉeestantoj, kiom kutime, ĉar multaj vintroferiis.

La sekvintan matenon, mi adiaŭis la tri ĉarmajn vidvinojn por iri al Pollando. Sinjorino Maria miris, ke mi trapasos Kristnaskon en Krakovo, ĉar, diris ŝi, kristanoj trapasas tiun tagon kun siaj familioj. Mi diris, ke kristaneco mia permesas, ke oni vidu la gepatrojn en novembro kaj februaro, kaj uzu la vintrajn feriojn por turismi. Ĉar mi diris, ke mi ne estas katolika kiel ŝi, ŝi demandis, ĉu mi estas ortodoksa, kaj miris pri mia respondo, ke la ortodoksa eklezio estas en Francio kvazaŭ nekonata. Sed ŝi konsentis, ke ĉiu individuo havu liberecon pri opinioj.

Jakelino

(daŭrigota ; venontfoje : de Slovakio al Polio tra Ĉeĥio)

Nia kriminala felietono

N A C I A A L V O K O

de la kolektivo por neobeema parolo.

Ĉiam pli multaj junaj francoj estas persekutataj, malliberigataj, kondamnataj, rifuzinte soldatservi. Generalo Barthez, direktoro pri nacia servo, deklaris, ke ili estas 3700 po unu jaro. Tiel verŝajne estas proksimume 18 000 da ili nuntempe en malleĝa situacio. Elektante ekzilon en alia lando, aŭ daŭrigante la lukton publike aŭ kaŝe sur la ŝtata teritorio, ili alvokas nin per sia mema ekzisto kaj per sia praktiko.

Denuncante la rolon de la armeo kaj la kreskantan militistigon de la socio, rifuzante obeon, kontestante la konceptojn pri patrolando, hierarkio, maskleco, rezignacio, ili respondas ne al la ordono, al tiu nacia servo, kiun ili sentas antaŭ ĉio kiel trudlermejon por establitaj normoj.

Rifuzante la statuton de soldatservrifuzantoj, kiun ili taksas pli kaj pli senigita je ĝia signifo fare de la civilaj kaj armeaj aŭtoritatoj, transirante la nuran antimilitaristan lukton, ili volas repreni, per sia tuta oberifuzo, la povon pri sia propra vivo, rifuzante fariĝi nuraj numeroj.

Kreita en 1978, la bulteno "Avis de Recherche" ne ĉesis esti la respegulo, la renkontejo kaj la ligo de la francaj grupoj de armerifuzantoj, kaj de la dizertintoj izolitaj, malliberaj aŭ sinkaŝantaj. Ĉiun duan semajnon "Avis de Recherche" aperigas aktualaĵojn pri armerifuzo kaj analizojn kaj dokumentojn pri la militistigo de la socio.

Disidenta parolo, neobeema parolo, ribela parolo, ĝi estas por la ŝtato silentigenda parolo.

La 14an de aprilo, plendo kontraŭ nekonato estis farita por identigi la redaktantojn de "Avis de Recherche". La poŝta kesto de la gazeto estis blokata de persekutisto pro decido de la nacia ĝendarmaro.

TIO SIGNIFAS VERAN MALPERMESON DE LA NEOBEEMA GAZETO.

Ĉefpunkto de la persekutoj farataj de pluraj monatoj kontraŭ la tuta antimilitarista movado (aresto de soldatservrifuzantoj de movado OP 20, multaj procesoj pro insulto kaj kalumnio kontraŭ la armeo, subpremo de resendintoj de soldatlibretoj, ktp) kaj kontraŭ la duonkaŝe organizitaj grupoj de tutaj oberifuzantoj, tiu malpermeso estas aparte grava, kaj

ni opinias, ke urĝas interveni, kia ajn estas nia konsento aŭ nia malkonsento pri la elekto mem de la tutaj rifuzantoj.

Tial la grupoj, organizoj, individuoj kaj kolektivoj, kiuj subskribis tiun alvokon, konsiderante la persekutojn kontraŭ "Avis de Recherche" kiel gravan netolereblan atencon kontraŭ la libereco de gazetoj kaj esprimado, konsiderante tiujn persekutojn kiel signojn de kreskanta subpremado de la tuta antimilitarista movado, konsiderante tiun subpremado kiel eron en tuta entrepreno de kriminaligado kaj tretado de la multaj insuloj de rezistado celanta ĝeneralan kontrolon, konsiderante, ke ne plu eblas resti malaktivaj pro la risko fariĝi objektivaj kunkulpantoj kun tiu subpremado, deklaras :

- ni aprobas kaj solidariĝas al la daŭrigado de la bulteno "Avis de Recherche"
- ni aprobas kaj solidariĝas al la kreado de kolektivo por neobeema parolo por rifuzi la malpermeson de "Avis de Recherche"
- ni intervenas ĉe nia loko kaj laŭ niaj rimedoj por denunci kaj fiaskigi ĉian novan kreskon de la subpremado de la movado de tuta oberifuzo.

\* \* \*

Tiu teksto estas proponata al francaj aktivantoj antimilitaristaj aŭ liberecanaj, kaj al individuoj, kiuj luktas kontraŭ militistiĝo.

Unua listo de subskribintoj aperos en diversaj gazetoj. Francoj povas :

- peti la originalan tekston ĉe CPI, 139 rue des Pyrénées, 75020 PARIS, por subskribo kaj diskonigo
- sendi al la sama adreso ĉekojn baritajn sen mencio pri ricevonto
- meti kandelon al kiu ili volas, por ke la ĉekoj ne resurteriĝu en la poŝon de la persekutisto malgraŭ la alprenado de tiu nova adreso.

Ne-francoj povas :

- sendi protestleterojn al la ambasadejoj de Francio, aŭ rekte al Ministère de la Défense, 14 rue Saint Dominique, F 75007 PARIS
- diskonigi la informon ĉe interesigantaj medioj de siaj landoj. (komunikis Jakelino)

El letero el Argentino :

\*\*\*\*\*

"...En nia lando la situacio estas trankvila, la timo - timo trudita de la urbaj gerilanoj - apartenas al la pasinteco, kvankam kelkfoje aperas iu izolita frenezulo kun detruo, sed ne gravas. (...) Kompreneble, la vivkosto estas tre alta. Laŭ laboro bonege farita de la sindikato de komercaj komizoj de la urbo Rosario, la monata budĝeto por familio el kvar personoj (gepatroj kaj du filoj) estas en argentina mono 714.410 \$. Miascie, tiu kvanto ne estas sufiĉa. Necesus 150.000 \$ pli, tio estas 854.410 \$. Krome, en la menciita budĝeto ne estas ludiloj kaj distroj por la infanoj, teatron tiu ĉi familio ne vizitas, filoj ne konas ĝin, kinejon iras nur unu fojon ĉiun duan monaton, lernejoj elementoj ne estas sufiĉaj, la patro aĉetas nur kvar ĵurnalojn monate. Ankaŭ miascie estas malfacile lupreni sanan loĝejon per \$ 272.961 (oni devas pagi almenaŭ 300.000 \$). Salajroj estas tre maltaj. Helpmasonisto povas gajni monate 270.000. Edzigita, 300.000. Komerca komizo gajnas pli-malpli 340.000 \$...."

Jen anarkista kanto kontraŭ faŝismo, tradukita el la itala fare de nia itala peranto, Alessandro Panerai :

\*\*\*\*\*

### El la Montoj de Sarzana

Momento de pasio, tagoj de malĝojo.

Mi skribas al vi, kara patrino.

Morgaŭ okazos la batalo

Kaj ni mortigos la nigran brigadon.

El la Montoj de Sarzana iam ni malsupreniros.

La bataliono Lucetti estas liberuloj kaj nenio plu.

Kuraĝon kaj ĉiam antaŭen. La morto aŭ nenio plu.

Parolas la ŝafistoj el la Montoj Sarzanelli.

Pli forta estos la krio ĉe nia alveno tie supre

Kaj por Petro Gori. Ni malsupreniros.

\*\*\*\*\*

Directeur de publication : J. Simonet. CPPAP n°58651.

Imprimeur : C. Baudé, F 47340 Laroque Timbaut

\*\*\*\*\*

# E-VIVO

En Gujan-Mestras la 17an kaj 18an de majo 1980.

\*\*\*\*\*

La 17-18. de Majo 1980, en Guĵano (Ĝirondio) rendezuis la esperantistaro el sudokcidenta Francio. Multaj departementoj estis reprezentitaj, sed plej imponis la forta partopreno de niaj ĝirondiaj geamikoj, i.a. tiu de la vigla E-asocio de Gujan-Mestras, al kiu la tuta movado nun dankas nekutimaĵon : kulturcentron kun nomo "L.L.Zamenhof" !

Tiu evento estas des pli eksterordinara, ke ĝi okazis en urbeto, kie la E-kursoj malfermiĝis nur antaŭnelonge, sub la impulso de P. Sevilla, kiu cetere priskribis siajn klopodojn en la 18a numero de "Laŭte!" (marto '79). Ĉi-jare tie naskiĝis loka E-asocio kaj la tuta loĝantaro nun ne plu povas ignori la fenomenon esperanto, kies kreinton honoris la 18an de majo la vicurbestro, inaugurate novan kulturcentron kun nomo "Zamenhof".

Centre Culturel  
L.L. Zamenhof  
Créateur de  
l'Espéranto  
(1859-1917)

Verdire, temas ne pri nova, luksa konstruaĵo, sed pri la malnova poŝtejo, kiu, post internaj modifoj kaj refarbado, povos plu utili el la publiko kiel kulturcentro.

Sabaton posttagmeze, 16 personoj kandidatis por la Atesto pri elementa lernado. Sed por duono el la ekzamenitoj tiu provo okazis ion tro frue. Venontjare, certe la "afero" estos matura kaj la fruktoj rikolteblaj.

Sabaton vespere, amiko Leo vizitigis al ni Japanion per la belaj diapositivoj, kiujn Gajta kaj li fotis okaze de siaj du vojaĝoj tie. Duobla plezuro por la spektantaro : okula kaj orela, ĉar Leo ravis nin ankaŭ per siaj komentoj en modele elparolata esperanto.

Bankedo kronis la tuton, dimanĉon tagmeze, en la restoracio de S-ano Lavandier, kie atendis nin pliaj surprizoj : gustumado de ostroj donace de la restoraciestro kaj giganta Esperanto-kuko - verko de S-ano Lavandier - ĉe la fino de

ĝoja bankedo, kiu sukcesis varmigi la atmosferon de iom malvarmeta salono.

Mirinda Gujan-Mestras ! Kaj certe ne malplej miris la subskribanto, kiu, antaŭ 26 jaroj, foliumis tie sian unuan E-kurslibron, kaj tiam tute ne povis imagi, ke iam li havos la okazon aŭskulti tie ne plu rekoneblan samlernejanon, nun vicurbestron, verve inaŭgurantan Zamenhof-kulturcentron antaŭ svarmo da verdstelaj adeptoj ! Kribo.

En Orientaj Pireneoj  
\*\*\*\*\*

S-ro René LLECH-WALTER, Prezidanto de la Kultura Esperantista Centro en Perpignan, prelegis dufoje, dum la oficialaj horoj, en Kolegio Albert Camus en Perpignan, en la unua trimestro 1980. Ĉiujn merkredojn li veturas al Argelès-sur-Mer por gvidi kurson de esperanto kun la helpo de S-ro Lagoutte, kiu loĝas en "Le hameau du Soleil" apud la marbordo en Argelès-sur-Mer.

Du piknikoj okazos en Argelès-sur-Mer : la unua en la ĝardeno de S-ro Fernandez en Julio, la dua en la ĝardeno de S-ro Llech-Walter, 38 boulevard de la Mer, en aŭgusto. Informojn pri la datoj donos, en junio, la Kultura Esperantista Centro, 72 avenue du général de Gaulle, 66000 Perpignan.

La 73a Franca Kongreso okazos en Perpignan de la 6a ĝis la 9a de Junio 1981. Organizas la Kultura Esperantista Centro, 72 av. Général de Gaulle, 66000 Perpignan. Oni antaŭvidas renkontiĝon kun hispanaj samideanoj.

En Atlantikaj Pireneoj : La grupo "Pau-Adour" kuniĝos la 30an de junio kaj la 29an de septembro, je la 19a 30 en la restoracio Nolibos, 18 bd. Champetier de Ribes, 64000 Pau. Tel.:(59) 32 02 42.

Novaĵoj el la Vaŭkluzo Federacio :  
\*\*\*\*\*

Pasintaj monataj renkontiĝoj en Avinjono :  
- la 10an de januaro, la ĉeestantoj manĝis du reĝkukojn, ludis kaj... trinkis je via sano! Prizorgis tiun

tagon Simone HUMM kaj Jacqueline DUFAY.  
- la 14an de februaro Lili kaj Joe BRISCOE prezentis Brition per diapozitivoj. La du prelegintoj kaj la ĉeestintoj komune vespermanĝis en kafeterio Cap Sud.  
- la 13an de marto Mimi kaj Gustave BLARY parolis pri sia vojaĝo al Meksikio. Ili prezentis belajn diapozitivojn.  
Kursoj: Kontentige daŭre funkcias la kursoj en la kulturdomo. Simone HUMM havas du perkorespondajn lernantinojn en Vaŭkluzo. Roger MOTTO daŭrigas sian agadon sur la fervojista tereno kaj li regule redaktas la bultenon de la francaj fervojistoj. Venonta monata renkontiĝo : la 12an de junio.

Renaskiĝo de malnova tradicio : En MAZAN (84), la lastan dimanĉon de julio, reokazos "LOU CARRI" ("la ĉaro") kun defilado en historiaj kostumoj. La festo komenciĝos per grandega pikniko. Estus okazo por somera renkontiĝo !

Aŭtuna fervojista renkontiĝo okazos en VAISON LA ROMAINE de la 29a de septembro ĝis la 5a de oktobro. Pliajn detalojn petu de Roger MOTTO "Les Magnolias", 27ter avenue du Moulin Notre-Dame, 84000 AVIGNON. Jam 70 enskribiĝis !

La jara kunveno de la Vaŭkluzo Federacio okazos la 22an de junio en Partage des Eaux (Isle sur Sorgue) okaze de la pikniko organizota de la Karpentrasa Grupo.

En Bretonio  
\*\*\*\*\*

"An Esperanteg, yezh neptu, a lak aesoc'h an darempredoù etre ar pobloù hep izelaat den ebet dre e yezh."

Jes! Tio troviĝas sur la dulingva (bretona-franca) varbafiŝo eldonita de nova E-klubo en Bretonio, 9 square de Provence, 35000 RENNES.

En "Guide pratique de l'Etudiant" 79-80 (p.141) la franclingvanoj povas legi informojn pri esperanto kaj noti adresojn por sekvi E-kursojn. (komunikis : Laŭrenco).

Katalunio : Ĝus eldoniĝis tie la broŝureto "Esperanto en 24 paĝoj", sed en kataluna lingvo. Interesatoj povas ricevi ĝin, sendante 50 uzitajn poŝtmarkojn el iu ajn lando al : J. Perez, Apdo 27066, Barcelono, Hispanio.

IV

Aĝenia Esperanto-Rondo  
\*\*\*\*\*

Ĉiuj geesperantistoj de Lot-Garonio partoprenu la ĝeneralan "assembleon" de Aĝenia Esperanto-Rondo, sabaton 21an de junio, en CLAIRAC (en la urbodomo, je la 14a 30).

Ĝi ja estos la nura, krom la informkunveno en Tonneins, en aŭtuno, kiu estos okazinta en nia departemento en la lernjaro 1979-80, do des pli grava por la revigligo de E-aktiveco en Lot-Garonio en la venontaj monatoj.

Tagordo : bilanco (?) de la ĵus pasinta jaro, stato de la kazo, nova respondecklaro, perspektivoj por la venonta jaro (propagando, kursoj), ĝisdatigo de la oficiala grupkajero, eventuala ebleco por iuj gegrupanoj helpi pro la kreskanta laboro por "Laŭte" kaj "la broŝurservo", ktp, ktp.

Ĝirondio  
\*\*\*\*\*

- De la 20a ĝis la 30a de majo okazas (is), en BLANQUEFORT, animado, kies temo estas komunikado. Nia grupo starigas (is) ekspozicion videblan dum la tuta tempo ; kaj ni deĵoros (is) ĉe budo de la 27a ĝis la fino, ĉiutage dum la tuta posttagmezo. Verŝajne jen bona okazo por konigi Esperanton kiel komunikilon.
- La lasta monata kunveno de nia grupo okazos en Larrat (kampara domo de Caïta kaj Leo Robert) la 8an de junio. Ĉiuj partoprenontoj kunportos sian propran tagmanĝon kaj ni piknikos sub la tilio, espereble ! Joël

\*\*\*\*\*

"Groupe d'action pour l'Espéranto", 123 rue de Royan, F 16710 SAINT YRIEIX, disvendas jenan materialon uzeblan en Francio :

- teksto de la leĝpropono n-ro 1550 ĉiu ekz. 0,15FF
  - flugfolio "Qu'est-ce-que l'Espéranto?" ĉiu 0,15
  - triangula glumarko "Amitié dans le monde par l'Espéranto" (blanka aŭ flava fono) ĉiu 0,50
  - glubanderolo 7x40cm "E-o, la langue internationale" 1,20
- La prezoj inkluzivas la afrankon por Francio, kaj ŝajnas vere malaltaj !